

LA ROLO DE LA PERSONA FAKTORO EN LA ESPERANTA LITERATURO (LA VERKISTO)

“Esti verkisto? Ho, tio estas la plej simpla afero! Neniu estas bezonata por tio – krom ion da papero, skribilo kaj, kompreneble, talento”. Konstato konata ĉie en la mondo, ripetata foje ironie, foje serioze. Ĉu similaj asertoj estas akceptindaj ankaŭ en Esperantujo?

Dum en aliaj literaturoj la verkistoj elektigas spontane – eĉ en tiuj landoj, kie la arton verki oni instruas en altlernejoj – por fariĝi Esperanta verkisto oni bezonas kelke da kondiĉoj plenumendaj. El ili la unua estas, ke la estonta verkisto iukaze renkontiĝu kun la lingvo kaj movado Esperanta. Kaj se jam renkontiĝis, tiam ankaŭ simpatii kun ĝi en tia grado, kiu favoros ellernon de la lingvo kaj partoprenon en la movado. Pri la lasta punkto aŭdeblas objetoj: kial verkisto devus partopreni en la movado? Kompreneble, ne tiel, ke li nepre iĝu ĉiofaranto de loka grupo, tamen li vivu en la movada atmosfero, konsentu kun la movadaj celoj. Sen tia adaptiĝo ĝis nun neniu fariĝis, eĉ ne fariĝos, verkisto en Esperanto... Se la estonta verkisto eklemis la Lingvon Internacian, li devas daŭre profundigi sian lingvokonon, sen kiu li ne povus esprimi sin en tia nivelo, kiel en la gepatra lingvo.

Estas do la unuaj, objektivaj kondiĉoj. Sed ne malpli gravaj estas la subjektivaj, nome, ke la esperantistiĝinto havu la ambi-

cion fariĝi verkisto. En tia okazo, se la konkernato estas juna kaj se li, antaŭ ol renkonti Esperanton, jam havis verkistan ambicion, tiam lia “verkistiĝo” estos afero tute simpla kaj natura, ĉar li eklaboros en la nova lingvo kaj verkante ne plu preferos la gepatran.

Tiel okazis ekzemple kun Kálmán Kalocsay,¹ kies poezia talento en Esperanto elmontriĝis post kiam liaj hungarlingvaj poemoj aperis en la plej altnivela tiutempa hungara literatura revuo “Nyugat” (njugat – okcidento). Pli kaj pli enamigante al Esperanto Kalocsay ĉesis verki hungare.

Povas okazi, ke oni maturiĝas malfrue – el naciaj literaturoj estu menciita la nomo de Nelly Sachs, kiu fariĝis kiel pli ol kvindekjarulino kaj en sia 75a jaraĝo gajnis la Nobel-premion... Nek similan, nek pli modestan ekzemplon oni trovas en la literaturo Esperanta.

Okazas ankaŭ inverse – kiam la aŭtoro post preskaŭ abortitaj nacilingvaj verkistaj klopodoj, post fiaskoj aŭ duonsukcesoj, kvazaŭ dronante etendas helpopete la manon al Esperanto kiel al lasta ebleco por pravi, ke malgraŭ ĉio li tamen fariĝos verkisto. En plejmulto de la kazoj tio sukcesas – ne pro la intertempe pli grandiginta talento de la verkisto, ho, bedaŭrinde ne: la kaŭzo estas, ke nia literaturo ĝis nun malsanas pro la diletantismo, fenomeno neevitebla en ĉiuj

literaturoj. Tamen specifo de la esperantista verkanta kolektivo estas en proporcio de malsamkvalitaj verkaĵoj. Malsame talentaj aŭ malsame erudiciaj aŭtoroj havas do ofte la saman ŝancon prezentiĝi antaŭ la internacilingva publiko.

Estas ne superflue menci tiujn kazojn, kiuj ne troveblas inter la motivoj por fariĝi verkisto en Esperanto. La unua estas, ke la verkisto rekonata en sia nacilingva medio, ne ŝanĝas la lingvon ellemante Esperanton. La tipa ekzemplo estas Mihály Gergely (mihajgergej), kiu, konatiĝinte kun Esperanto, jam estis aŭtoro de multaj volumoj aperintaj en la hungara lingvo. Malgraŭ tio, ke li ĉefredaktis *Hungaran Vivon*, dediĉante tre multe da tempo kaj energio por la movado, li verkis nur tre malmulte da beletraĵoj en Esperanto. (Rimarko de la aŭtoro: la terminoj "verki" aŭ "verkado" oni identigu en tiu ĉi eseo kun la skribaj manifestaj ekskluzive beletraĵoj).

Lastatempe — oni povus argumenti kontraŭ miaj tezoj — okazis iusence novtendenca fenomeno: Ladislav Podmele, ĉeĥa poeto, en sia hejmlando konata sub la plumnomo Jiří (jirĵi) Karen ellensis Esperanton en sia ĉ. 60-a jaraĝo kaj ekverkis en la por li nova lingvo... Miappinie lia ekzemplo estas ankoraŭ tro freŝdata — apenaŭ pli ol unujara — por ke ni povu kalkuli kun ĝi. Cetere, la menciita aŭtoro ne ŝanĝis la lingvon, li verkas plu ankaŭ ĉeĥe.

Similajn dulingvulojn ni povas trovi en nia literaturo — la diferenco estas nur, ke la verkistoj kiel ekzemple Marjorie Boulton kaj Sándor Szathmári fariĝis dulingvaj literaturistoj en relative juna aĝo.

Sed se iu jam ekverkis en Esperanto, plej verŝajne ne plu "konvertiĝos" al la nacilingva literaturo. Pli konkrete: ne estas konata tia literatura kariero, kiam iu unue verkis nur Esperante kaj poste nur nacilingve, aŭ komencinte kiel nacilingvulo

li reirus post la esperantista epizodo al origina nacilingva kariero. Same neniu ankoraŭ fariĝis eminentulo en literatura kampo el la plej naturaj uzantoj de Esperanto, do el la denaskaj esperantistoj.

Sekve, la homo, kiu deziras fariĝi Esperanto-verkisto, elektas iusence specifan vivovoĵon. Certe, kiom da personecoj, tiom da diversaj pretendoj pri la elekto. Ĉu kariero de la internacilingva verkisto estas kontentiga por la individuo? La verkisto precipe deziras esprimi sian konceptadon pri la mondo kaj efektiviĝi siajn planojn eĉ kontraŭ gravaj malfacilaĵoj. Sed venas la tempo, kiam oni revuas la pasinton, ŝatante senti, ke la vivo estis rezulthava, eĉ se ne rezultplena.

Kun kiaj sentoj povas bilanci la Esperantaj verkistoj?

La plej grava estas aspekto, ĉu ili povis esprimi sin sen ideologiaj kompromisoj. Je tiu ĉi demando la respondo estas sendube pozitiva. La verkado internacilingva certigas al la kreanta individuo relative grandan liberecon. El tiu ĉi vidpunkto la Esperanta literaturisto estas multe pli bonŝanca ol lia kolego verkanta nacilingve. En Esperantujo ne ekzistis kaj ne ekzistas cenzuro, kaj ne povas okazi, ke libro restu manuskripto pro politikaj kaŭzoj.

Nature, la mondpolitika situacio jam ne unufoje en la historio malfaciligis la publikadon, sed la internacia karaktero de nia movado rezultigas, ke la aŭtoroj povas trovi eldoneblecon por siaj libroj en alia mondparto pli facile ol verkistoj ligitaj al sia nacilingva tereno.

Alia tre grava demando estas, ĉu la verkoj de niaj aŭtoroj atingis vastan publikon. Tiurilate la respondo estas multe pli pozitiva ol antaŭe. La eldonkvantoj de la Esperantaj libroj estas daŭre malaltaj, egale ĉu temas pri valora aŭ periferia literaturaĵo, pri temo furora aŭ nealloga, pri poezio aŭ

prozo. Pri tio kulpas parte limigitaj financaj eblecoj de la eldonejoj, parte malalta interesiĝo de la publiko. (Pri la lasta punkto mi intencas verki apartan studon, nun temu nur pri la tute menciita kialo). Tamen ambaŭ motivoj estas kunigitaj: ĉie en la mondo la eldonejoj funkcias profitcele, eĉ en tiuj landoj, kie la libroeldonado estas finance subtenata de la ŝtato.

Do, kiu en la mondo riskus bankroton eldonante Esperantajn literaturajojn? Tiam oferon ni povas atendi nek de neesperantistaj entreprenoj - kial ili flasku pro la fremda intereso? - nek de la esperantistaj, kies flasko trafus unuavice la movadon mem.

Adekvate la malalta eldonkvanto kaŭzas, ke la verkisto ne nur morale sed ankaŭ finance malmulte profitas de la aperigo de sia verko. Verŝajne ne ekzistas verkisto, kiu kapablu vivtenadi sin kaj la familion el sia literatura agado peresperanta. Kaj kiu provis tion, tiu pasigis la vivon en tre modestaj, se ne diri mizeraj, cirkonstancoj.

La plej karakteriza ekzemplo estas tiurilate Julio Baghy, kiu cetere ne povis plendi pro manko de populareco - liajn librojn la esperantista publiko volonte aĉetadis. Tamen li vivis kun sia familio dum pluraj jardekoj en unuĉambra malkomforta loĝejo, sen banĉambro. Nur du jarojn antaŭ lia morto Hungara Esperanto-Asocio sukcesis prizorgi por li ĉe la aŭtoritatoj la novan, duĉambran kaj komfortan loĝejon. Tio tamen ne estis rekono pro lia ĉamviva verkista agado, sed anticipa aranĝo, nome ke la partoprenontoj de la 51a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto ne havu malfavoran impreson pri la lando renkontante Julion Baghy en cirkonstancoj nekonvenaj.

Ankaŭ la aŭtoroj, kiuj ne intencas vivtenadi sin sole el verkado internacilingva,

laborante plu en siaj fakoj, plivere oferas aperigante siajn verkojn anstataŭ gajni.

Kálmán Kalocsay, en sia patrujo tre rekonata fakulo kiel ĉefkuracisto, vivis multe pli modeste ol la simile rekonataj ekspertoj, kiuj ne okupiĝis pri „ĥimeroj” kiel Esperanta literaturo. Kalocsay estis doktoro pri medicinaj sciencoj kun honora titolo de universitata profesoro, el lia faklibro pri epidemiaj maŝanoj studis generacio de estontaj kuracistoj - tamen li vivis en triĉambra loĝejo, ne luksa kaj luita de la ŝtato. Malgranda loĝejo, en kiu li vivis ĝis la dua mondmilito, estis dum la bataĵoj trafita de bombatako, sed li translokiĝis al same malgranda...

La plej alta sumo, kiam li ricevis por sia libro, estis nur dolaroj (unu dolaro po ekzemplero) de la eldonejo Stafeto. Li havis nek aŭtomobilon, nek somerumejon, nek alian el tiaspacaj „luksaĵoj”, kiuj post la liberiĝo de Hungario fariĝis atingeblaj ne nur por la ĉefkuracistoj, sed ankaŭ por kiu ajn alia tavolo de la loĝantaro. Ne mirinde, ke tiu ĉi fakto okulfrapis lian edzinon, kiu tre ofte instigis lin okupiĝi prefere pri iu alia, pli profitdona agado.

Kalocsay almenaŭ ne havis gravajn materialajn zorgojn, kiel ekzemple Ludoviko Tárkony (tarkonj) kiu post la bombdetruo de Budapeŝto restis senhejma, kaj el sia oficista salaĵo povis lui nur unu ĉambron. Tiel li vivis, fraŭle, solece kaj ankoraŭ en la 70-aj jaroj (tiam aĝa pli ol 70 jarojn) li serĉis subluon per la „Budapeŝta Informilo”.

La menciitaj personecoj ne estas esceptoj. Se la Esperanta verkisto ne disponas pri ia kapitalo, li - sendepende de la socioordo - estas devigata vivi modeste. Oni povus demandi: kial la ŝtato, kies civitano li estas, ne helpas lin, precipe se temas pri ŝtato socialisma? Ĉar la internacilingvaj verkistoj - ili vivu kie ajn en la mondo -

fakte restas "eksterlandanoj" en sia propra naskolando. Ili ja verkas en lingvo rekonata al la plejmulto de la ŝtatanoj, ili okupiĝas pri aferoj, kiujn ne enfokusigas la intereso de la unuopaj ŝtatoj.

Kaj la movado? Finance ĝi neniam povis esence subteni siajn verkistojn. Tio validas kaj pri la naciaj asocioj kaj pri Universala Esperanto-Asocio. Komprenible, des pli, se temas pri la periodoj, kiam la tuta ekzistado de la movado estas minacata – ja en tiaj ĉi cirkonstancoj oni eĉ ne rajtus postuli ion ajn.

Cu vere tiel gravas la materiala bonfarto? Oni povus kompili liston el la nomoj de mondliteraturaj personecoj, kiuj vivante mizere kreis grandiozajn verkojn. Tia argumentado – devenanta el romantikaj imagoj pri la "nobla malriĉeco" – hodiaŭ estas ne malpli faŝa kaj hipokrita ol en la pasinteco. Kiu plenumas pretendan intelektan laboron, tiu meritas havi konvenajn kondiĉojn, tiel ke ĉiujn siajn fortojn li povu fordoni al la verkado.

Bedaŭrinde, tiu ĉi temo estas preskaŭ tabua, kvazaŭ menciigi ĝin estus malindaĵo apud tia nobla kaj sankta afero kia la literaturo estas.

Tamen, se la verkistoj ne povas ricevi adekvatan honoraron, eble konsolas ilin almenaŭ respekto de la legantoj... Nu, ankaŭ tio estas relativa. Sendube, en Esperantujo la verkisto estas morale rekonata. La publiko estimas lin, eĉ se ne legas liajn verkojn – mi povus aldoni iom malice. Kun kaŝita estimo rigardas lin eĉ tiuj esperantistoj, kiuj opinias literaturon ia akcesoraĵo, kaj preferas, ke la lingvo kaj la movado streĉu ĉiujn fortojn por penetri unuavice kaj antaŭ ĉio en la teknikajn sferojn de la vivo. En liaj okuloj la verkisto estas – pardonon pro la komparo – "sankta ĥovino"... Sed ĝenerale la verkisto – kaj tion mi jam konstatas sen ironio – gvidas la prestiĝan tavolon de la movadanoj. Kiu kreas ion vere valoran, tiu

rajtas senti la sinceran estimon kaj amon de la legantoj.

Bedaŭrinde, plej ofte de malproksimo! Nome la esperantista verkisto – kontraste al la nacilingva – vivas dise de la legantoj. Li havas tre malmulte da eblecoj renkontiĝi kun la publiko. Neniu alparolas lin en la kafejo – kiel la nacilingvan kolegon – ekzemple per jenaj vortoj: "Mi opinias, sinjoro, ke Maria en via lasta romano estas vere bonŝanca knabino?". Aŭ: "Kial vi povis fuŝi per tia fino la belegan historion?" Demandu kiun ajn el nacilingvaj verkistoj, kiuj renkontiĝas tago post tago kun siaj legantoj, kiom stimulas ilin eĉ simplaj banalaj starpunktoj.

La Esperanta verkisto renkontas la legantojn dum internaciaj renkontiĝoj, ekzemple en la Universalaj Kongresoj, se ... Se li povas partopreni. En bonŝanca – kaj ege malofta kazo – UEA invitas lin, aŭ delegas lin la nacia asocio. Sed UEA ne havas monon, la nacia asocio ankaŭ ne. Restas ankoraŭ unu solvo – nia aŭtoro veturas proprakoste, sed ... li ankaŭ ne havas monon.

Do, li laboras plu, izolita de la publiko. Izoliteco – jen karakteriza esprimo por prezenti la vivstilon de tiaj verkistoj. La perada kontakto, kiel korespondado, ne povas anstataŭi la senperajn rilatojn. Kaj tio validas ankaŭ pri la kontaktoj kun la kolegoj.

Pri la valoro de la tiel nomata "literatura vivo" en Esperantujo oni povas disputi. Certe multaj tute ne bezonas ĝin, sed la verkistoj diferencas unu de la alia laŭ siaj karaktero, temperamento ktp., kiel ĉiuj homoj. Do, pro la geografiaj distancoj estas malhelpataj partopreni la "literaturan vivon" ankaŭ tiuj, kiuj suferas pro ĝia manko.

Mi jam menciis, ke la Esperantaj literaturistoj ĉiam restas "eksterlandanoj" en siaj patrujoj – komprenible escepte de la

kromverkantoj en la naciaj lingvoj — el kio sekvas, ke ili ne kontaktas kun la samnaciaj kolegoj. En nia literaturhistorio ni trovas rara okazintaĵon, kiam samtempe kaj en la sama urbo aŭ loko vivas grupo da Esperantaj verkistoj, farante amikan rondon. Tiel okazis en la epoko de la “Budapeŝta skolo”, en la 20aj kaj 30aj jaroj, kiam ĉirkaŭ la revuo “Literatura Mondo” kolektiĝis la kremo de la tiam Esperanto-literaturo. Ĝi estas la ekzemplo kiel fruktodone influas la evoluon de la literaturo la fakto, se ĝiaj kreantoj ne agadas izolite.

Verkisto vivanta en nacia medio ĝenerale havas la familion samdevenan. En avantaĝaj kaŭzoj li povas esperanlistigi la familianojn, akirante tiamaniere unu du legantojn (eĉ kritikantojn) en la rondo plej intima. Sed tio ne estas facila solvo. Kiel videble el la ekzemplo pri Kalocsay, eĉ tiu ĉi giganto ne sukcesis. Malgraŭ tio, ke oni moke nomas foje Esperanton “edzperanto”, inter la verkistoj nur tre malmultaj vivis aŭ vivas en internacia geedziĝo. Sed almenaŭ tiu malmulto povis liberiĝi de la premo de kompleta soleco.

Ni ne povas sufiĉe rekoni la strebojn de tiuj kreantoj, kiuj, spitante ĉiajn malfacilaĵojn, akceptas la sorton de la esperantista verkisto. Vilmos Benczik skribas en sia studo pri Heinrich August Luyken (Studoj pri la Esperanta Literaturo, 1980), ke la Esperantaj analoj malmulte informas nin pri la vivo de tiu ĉi aŭtoro. Ĝenerale ni povas konstati la samon pri ĉiuj esperantistaj verkistoj: pri iliaj vivo kaj personeco ni scias tre malmulte.

Do, kiu heroldo pri ili? Se temas pri verkisto nacilingva, ĉiam volonte parolas pri li la familianoj, amikoj — daŭraj atestantoj pri lia vivo. Ili scias multajn detalojn, kiuj helpas kompletigi la portreton, konas originon de unuopaj motivoj de liaj verkoj, la infanoj fieras pri la patro.

Sed kiu portu en homan proksimecon la Esperantan literaturiston? Ĉu la samlandanaj kolegoj, kiuj plejofte eĉ lian nomon ne aŭdis? Ĉu la familianoj, kiuj ne scipovante Esperanton, neniam legis liajn librojn? Ĉu la infanoj, kiujn tiom ne allogis la sorto de la patro, ke malgraŭ liaj instigoj kaj petegoj ili malakceptis ellerni tiun “strangan” lingvon? Ĉu la amikoj, kiuj vidante lin konstante okupiĝi pri iu stranga afero, paŝo post paŝo forlasis lin? Aŭ ĉu la najbaroj, kiuj scias pri li nur tiom, ke li certe estas maniako, kiu anstataŭ nokte dormi skribadas?... Kiu do heroldu pri li?

Mi ne dividus la opinion de la strukturalistoj, ke la personeco, kiu produktas artaĵon, ne gravas, ke oni devas ĉiam rigardi “nur” la verkon.

Tamen, ni esperantistoj, vole-nevole fariĝas strukturalistoj. Tiamaniere, ke ni simple prizentas la rolon de la verkista personeco en la estiĝo de la verko, kaj entute, la gravecon de la persona faktoro en la Esperanta literaturo. Mi estas certa, ke tiu ĉi ĝisnuna praktiko devas esence ŝanĝiĝi — en la intereso de nia literaturo kaj pere de ĝi en la intereso de la movado.

Do, kiamaniere trarompi la murojn de izoliteco, inter kiuj baraktas niaj aŭtoroj — malgraŭ tio, ke ili mastras la unikan instrumenton de interkomunikado, la Lingvon Internacian?

La plej okulfrapa ŝajnas anonimeco de la verkista kolektivo. Samcelanoj multspecaj kunvenas kaj entreprenas en dekaj da diversaj ligoj kaj asocioj, aranĝante regulan kontaktadon reciprokajn aŭ rilatadon kun parencaj institucioj, organizoj ktp.

La internacilingvaj verkistoj momente ne havas tian propran “domon”, sub kies ŝildo ili povus de tempo al tempo renkontiĝi. Tiurilate ili estas en malpli avantaĝa situacio ol la esperantistaj pedagogoj, fervojistoj,

medicinistoj, ĵurnalistoj ks. Kvankam la verkado de beletraĵoj estas afero ekstreme individua mi opinias, ke la plimulto de la verkistoj akceptus kun ĝojo fondiĝon de asocio, ligo aŭ minimume de klubo. Tia organizo kunvenigus, partoprenigus la verkistan anaron laŭbezone en diversaj agadoj kaj ĉe diversaj okazoj kaj en ties nomo la ano povus aŭdigi sian voĉon, se necese, antaŭ samideanoj kaj antaŭ la publiko neesperantista.

Neesperantista publiko... Antaŭ ĝi staras alia izola muro, multe pli forta ol la enmovada, ĉar konstruita el diverslingveco kaj antaŭjuĝoj kontraŭ la internacia neŭtrala komunikilo. Tiun ĉi baron la verkistoj aplikantaj la Zamenhofan lingvon sukcesas trarompri nur tre malfacile kaj nur en sporadaj kazoj. Ĉar la "eksterlandanceco" de la aŭtoroj en iliaj patrujoj implicas ne nur izolitecon kutiman en la movado. Pli grave — ilia izoliteco hejmlanda estas analoga al tiu de la movado, kiu daŭre aspiras akceptigon de Esperanto.

Do, la verkisto alfrontas la problemon de la disvastigo de siaj verkoj en la naciaj lingvoj. Beletraĵojn ĝis nun tradukitajn el Esperanto kaj eldonitajn libroforme eblus nombri per fingroj de ambaŭ manoj. Kutime la tradukon entreprenas aŭ la aŭtoro mem aŭ lia kolego eksterlanda. Tradukistoj ne ligitaj kun la movado ne ekzistas.

Ne estas superflue citi kelkajn faktojn pri la eldonkvanto de tri hungarigitaj Esperantaj libroj por konvinkiĝi, ke multe pli da homoj povis ĝui ilin hungarlingve ol Esperante. Jen:

C. Rossetti: *Kredo min, Sinjorino!* (tradukis S. Szathmári, 1958, aperis en 15 200 ekzempleroj); S. Szathmári: *Maŝinmondo* (tradukis la aŭtoro, 1972, 10 000 ekzempleroj); S. Szathmári: *Vojaĝo al Kazohinio* (tradukis la aŭtoro, 1957, 5 150 ekzempleroj, en 1972 10 000 ekzempleroj)

kaj en 1980 10 000 ekzempleroj.) (Fonto: *Budapeŝta Informilo*, febr. 1981).

Kompreneble, se la Esperanta verkisto tiamaniere povas fariĝi mondscale, tio estas avantaĝo ne nur por li, sed ankaŭ por la tuta movado. Nia literaturo trovus tiamaniere la vojon por fariĝi konsista parto de la mondliteraturo.

Problemo de la aŭtoro personeco kaj de lia laboro implicas la tutan agadsferon de la Esperanta kulturo. Ĉu estas entreprenotaj paŝoj sur tiu ĉi kampo por kunordigi la klopodojn de la individuoj kaj de la movado kaj tiel plifaciligi ilian komunan rolon kaj taskon? Universala Esperanto-Asocio nuntempe pridiskutas idearon, kies realigo povus akceli tiajn paŝojn. La pli preciza difino de la asocia kulturpolitiko — kaj sekve ankaŭ ties realigo — promesas perspektive la subtenon precipe al tiuj, kiuj per siaj klopodoj elmeritigis ĝin kaj samtempe volonte ĝin akceptus. Ne lastvice staras inter ili la Esperantaj verkistoj.

1) Miaj ekzemploj aludas plejparte hungarojn, ĉar el tiu ĉi medio mi sukcesis akiri la plej konvenajn informojn. Krome, la menciitaj aŭtoroj estas ĝenerale konataj en Esperantujo.

ESEO ricevinta "Premion Luigi Minnaja" en la Belartaj Konkursoj de UEA, 1981.

NASRUDIN

trad. KRIS LONG

*Najbaro petis ŝnuron de la majstro.
'Mi uzas ĝin. Por sekigi farunon.'*

'Ĉu farunon oni povas sekigi per ŝnuro?'

'Tre facile, se oni ne volas prunti ĝin.'